

# ***ELNA NEWSLETTER***

**NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM  
AND ESPERANTO AS A SOLUTION**

MARCH-APRIL 1985

---



ESPERANTO:

## **THE TALK OF THE WORLD**

UN Secretariat News, February 28, 1980

“Esperantists do not debate whether an International Language can be created: They simply speak their language as though it were the most natural thing in the World”

Humphrey Tonkin  
President, UEA

---

### **INSIDE:**

Esperanto on USENET  
Language and Culture  
Iran-Esperanto  
Seksegalecon en Esperanto  
Pentwinning

Esperanta Antologio  
Gaja Paĝo  
Amb. Ralph Harry on Tape  
Book Reviews  
Esperanto Travel News

## ESPERANTO SUR USENET - La Plej Granda Komputila Reto por Komputistoj

Neal McBurnett (Nil MakBrnet)

Proksimume 2000 komputiloj, kiuj uzas la "UNIX" (fabrikmarko de AT&T Bell Laboratories) sistemon, interkomunikas per la telefona reto kaj la "uucp" (Unix-Unix CoPy) programo. El tiuj, proks. 1000 (nomita USENET) ankaŭ subtenas elektronikan "nigran tabulon", nomita "netnews" (per-reta novaĵo).

La plimulto estas en Usono, sed verŝajne 250 lokiĝas en aliaj landoj (Britujo, Nederlando, Koreujo, ktp). Ĉiu, kiu rajtas uzi unu el tiuj komputiloj, povas submeti artikolon, kaj baldaŭ (inter unu sekundo kaj tri tagoj, laŭ distanco) aliaj povas ĝin legi. Uzantoj povas sendi ankaŭ elektronikan poŝton al specifa uzanto per la "Mail" (poŝta) programo. La artikoloj estas dividitaj en 200 novaĵgrupojn, ekz. "net.unix" por la UNIX sistemo, "net.politics" por politiko, "net.veg" por vegetarismo, ktp.

En oktobro 1984, mi komencis diskuton pri Esperanto en la novaĵgrupo "net.nland", kiu celas diskutojn pri natura (homa) lingvo, etimologio, ktp. Ekde tiam, ni diskutis Esperanton, la lingvan problemon, etimojn, ŝercojn pri "ampolŝanĝantoj" kaj aliajn aferojn. Mi submetis vortaron kun 2600 radikoj kaj la unuan lecionon de la perpoŝta kurso. Ĝis nun tridek legantoj komencis la kurson.

UNIX-sistemojn havas kaj la centra oficejo de UEA kaj BSO (kiu prilaboradas la Distributed Language Translation projekton en Nederlando (vidu artikolon en *ELNA Newsletter* nov-dec 1983), sed ĝis nun mi ne povis kontakti ilin.

Kiel antaŭe menciite en la *ELNA Newsletter*, CompuServe ankaŭ estas granda komputila reto, kaj oni ankaŭ povas diskuti Esperanton per ĝi. Por partopreni en USENET, oni bezonas permeson uzi UNIX sistemon, sed por CompuServe oni nur bezonas terminalon kaj modemon. Kontaktu Jim Deer, ESPO en Portlando, aŭ Radio Shack por pli da informo pri CompuServe.

Nu, kiel oni povas partopreni en tiu internacia diskutado? La plimulti da universitatoj havas UNIX sistemojn sur USENET, kaj multaj komputilaj kompanioj ankaŭ. Verŝajne oni nur devas entajpi "readnews -n net.nland" por legi la lastatempe aperintajn artikolojn. Se iu deziras korespondi rekte kun mi, mia elektronika adreso estas "ihnp4!druny!neal", kaj la poŝta estas 4825 W. Moorhead Cr., Boulder CO 80303, tel. [303] 538-4852. Amri Wandel (SFSU instruisto ĉi-somere kaj antaŭe prezidanto de TEJO) kaj Bruce kaj Judy Sherwood, verkistoj de la PLATO perkomputila instru-sistemo, ankaŭ havas adresojn sur la reto.

## LANGUAGE & CULTURE

### Prof. Harold Hill Becomes Honorable Tsunami-san

Set in Meiji-period Tokyo, *The Music Man* is a great success in Japan. Fujiko Shiatsu's version turns Prof. Harold Hill into the Honorable Tsunami-san, who persuades parents of Tokyo that he can lure young boys away from gambling and tea houses, and channel their high spirits into Sumo wrestling. Marian the Librarian takes on new lustre when transformed into Sakura, the shy geisha. The show includes a rousing rendition of "Seventy-six Kotos", not to be missed.

— San Francisco Punch, 2/24

## BILL HARMON "AMBASADOROS" EN ĈINIO

La mondfama Ĉina monata Esperantlingva gazeto *El Popola Ĉinio* preparas feston en majo por sia 35-jaradatreveno de la fondiĝo, kaj oficiale invitis po unu reprezentanton el diversaj landoj partopreni formalajn kunsidojn kaj festojn en Ĉinio dum 8-taga restado. Neoficiala informo atingis la redakcion de *ELNA Newsletter*, ke inter la gravaj eventoj en Ĉinio estos akcepto en la Granda Halo de la Popoloj en Beijing kun reprezentantoj de la Ĉina registaro kaj la nacia presfako, Guozi Shudian.

S-ro Harmon, Estrarano de ELNA kaj ties Komisiito por Centra Oficejo, portos oficialan gratulsaluton al *El Popola Ĉinio* en la nomo de ELNA kaj la Usona Esperantistaro. Li petas, ke se iu klubo, klaso aŭ grupo volas sendi rezolucion en la formo de salutletero, aŭ se iu individua Usona Esperantisto volas sendi individuan salutleteron al *El Popola Ĉinio* kaj/aŭ la Ĉina Esperantistaro, tiu sendu la leteron al Wm. R. Harmon, 1016 King Drive, El Cerrito CA 94530 prefere nefaldite en granda koverto. Ili estos formale transdonitaj je taŭga okazo en Ĉinio.

## Shuiti Yamakawa Comments on Esperanto and Japanese Culture in Visit to San Diego Esperanto Club

On the subject of language, Yamakawa said that the Japanese do not speak their own language clearly. "It is because they understand each other so well. They are like a couple who have been married for 40 years, knowing each other so well they can communicate in gestures."

As to why Japanese learn Esperanto, Yamakawa replied that initially it is out of curiosity but they stay with it "because the internal idea of humanism attracts them." "And," he went on, "it is a well-known fact that Esperanto acts as a bridge for learning other languages."

As to politics, Yamakawa explained that the Japanese don't argue publicly about politics. Americans can debate with the Chinese, but not with the Japanese, because the Japanese just don't debate."

— Ellie Stein

## ABONU AŬ REABONU

La Ĉinan Monatan Gazeton en Esperanto

## EL POPOLA ĈINIO

Twelve thick issues a year via Airmail, each with three large color sections. EPĈ contains material about the People's Republic of China, the national Esperanto movement, and on the international Esperanto movement as well.

1985 Prices:

1 Year	\$10.00
2 Years	\$17.00
3 Years	\$24.00

El Popola Ĉinio is one of the most outstanding Esperanto publications in the world. Look it over and you'll agree!

Subscribe through your local agent:

ELNA CENTRAL OFFICE  
BOX 1129  
EL CERRITO, CA 94530

## SEKSEGALECO EN ESPERANTO

– Konisi gaku, *La Movado*, 8/85

Jam de antaŭe konsciaj personoj diskutas pri la “seksisma” karaktero de Esperanto. Tiu problemo ja postulas seriozan konsideron en la nuna epoko... Esperanto estas do lingvo “inda je reformo en tiu rilato”. (John Wells: *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto*)

Plej evidente, la seksa neegaleco en Esperanto prezentiga en tio, ke ĝi posedas la sufikson por la ina sekso sed mankas tiu por la vira. La enkonduko de sufikso por la vira sekso estas nepre kondiĉo por ke nia lingvo iĝu libera de seksa diskriminacio. Sed tio, bedaŭrinde, ne donas kompletan solvon de la problemo.

En Esperanto troviĝas du specoj de vortoj, ĉe kiuj ni kutimas uzi la sufikson *in*.

1. La unua vortfamilio konsistas el vortoj kiuj propre estas neŭtraj rilate la seksecon. Tiaj estas, ekzemple, la participaj substantivoj (anto, into, onti; ato, ito, oto), la vortoj kun sufikso *ist*, *ul*, aŭ *an*. Ili estas propre neŭtraj. Prezidanto estas homo (= viro aŭ virino), kiu prezidas. Sed la ekzisto sole de la ineksa sufikso kaj ties aplikado al la radikalo *prezidant* certgrade senigis tiun ĉi je la “ajnsekseco”: ĉar troviĝas la esprimo prezidanto, oni sentas, se ne erara, tamen nepreciza aŭ eĉ maldeca, la uzon de *prezidanto* por inekskulo. Tiu kadukiĝo de ajnsekseco estas plej forta ĉe *ul*: junulo ekskluzive signifas *juna viro*, kaj tial oni nepre diras *gejunuloj* se temas pri ambaŭseksa konsisto. (Kp: oni neniam diras *geusonanoj*.) Tiel same, preskaŭa virsekseco altrudiĝis al la propre neŭtraj substantivoj kiel *doktoro*, *profesoro*, *redaktoro*, *ŝoforo*, *studento*, ktp.

2. La duan familion konsistigas tiuj substantivoj, kiuj propre esprimas virseksulon, kaj de kiuj oni ricevas la inan formon helpe de la sufikso *in*: *viro/virino*, *patro/patrino*, *frato/fratino*, *filo/filino*, *onklo/onklino*, *sinjoro/sinjorino*, *knabo/knabino*, *edzo/edzino*, *fianĉo/fianĉino*, *avo/avino* ktp. Tiu famili prezentas du problemojn.

Unue, la derivado de la ina formo el la virseksa estas kontraŭ la nuntempa ideo de la komplete egaleco inter ambaŭ seksoj. Eble multaj refutos tiun ĉi aserton: “Ne! Tio estas nur lingva konvencio.” Povas esti. Mi ne insistas. Sed ni alfrontas alian problemon, pli praktikan. Nome, ĉe tiuj duseksaj vortoparoj ni malhavas neŭtran (ajnseksan) formon. Escepto estas la paro *viro/virino*, al kiu respondas la neŭtra vorto *homo*. Foje iuj – precipe konsciaj samideaninoj – uzas la formon *homino*, supozeble por eviti la “hontigan” formon *virino*. Sed male al la intenco de la uzantoj, tio altrudas – ĉar nun mankas la vira sufikso – la virseksecon al la propre neŭtra vorto *homo*. Mi do malrekomendas la fomon *homino* almenaŭ ĝis enkondukiĝos la virseksa sufikso.

Ĉiuj sentas ĝenon en tio, ke oni devas diri jen *edziĝi*, jen *edziniĝi*, jen *geedziĝi* depende de la situacio. Kaj se oni volas diri ion pri unu el la geedza paro indiferente de la sekso, oni devas diri *edzo aŭ edzino*. Mankas la vorto kiu esprimas ajnan eskson. Iuj provis uzi la singularon *geedzo* por tiu celo, sed tio kontraŭas la jam tradician ambaŭseksan – ne ajnseksan – sencon de la prefikso *ge*.

Do, ekster la argumento pri la seksa egaleco, laŭ la pure praktika vidpunkto estas necese solvi tiun ĉi problemon: serĉi esprimon por ajnsekseco.

Ni nun iom antaŭvidu, kiel do la afero povos progresi.

Supozu, ke ni alprenu ian virseksan sufikson, *ed*, ekzemple.<sup>1</sup> Tio solvos la problemon pri la unua vortfamilio. Nun la vortoj *prezidanto*, *doktoro*, *studento* ktp esprimas ajnseksan personon, dum la virseksuloj estas esprimataj per *prezidantedo*, *doktoreda*, *studentedo* ktp. Sed kiel pri la dua vortfamilio? Estas preskaŭ sencece formi vortojn kiel *edzedo*, *patredo*, *onkledo* ktp ĉar ili havos la tute samajn sencojn kiel *edzo*, *patro*, *onklo* ktp. La lastaj sendube persistos konservi la nunan sencan ekskluzive viran.

La solvon por la dua familio sugestas la vorto *homo*, la neŭtra formo apud la paro *viro/virino*. Nome, ni bezonas tian neŭtran formon por ĉiu vorto en la dua familio. Ekz-e, ni povos enkonduki neologismojn *parento* apud la paro *patro/patrino*, *spozo* apud *edzo/edzino* ktp. Nur tiel oni povas esprimi la ajnseksecon per simpla maniero: unu-parenta infano, sensposa vivo ktp. Oni povos regule formi ankaŭ la vortojn *homedo/homino*, *parentedo/parentino*, *sposedo/sposino*, kvankam oni emos uzi la tradiciajn *viro/virino*, *patro/patrino* kaj *edzo/edzino*.

Eble iuj plendos, “Sed tio komplikigas la lingvon!” Jes, sed nur iom. La vortoj en la dua familio estas tre malmultaj kompare kun la tuta vortotrezoro de Esperanto. Kaj tre ofte uzataj. La ofta uzateco garantias pli facilan lerniĝon.

Konklude, la enkonduko de ia nova virseksa sufikso estas atendata, kaj krome, oni iom post iom enkonduki ankaŭ neŭtrajn neologismojn por la duseksaj vortoparoj, kiujn ni nun formas el la virseksa radikalo.

---

<sup>1</sup> Mi elektis tiun formon tute arbitre, kaj neniel pretendas, ke ĝi havas ŝancon enuziĝi. Ĉi tie ĝi havas nur eksperimentan valoron.

---

**SEKSO KAJ EGALCO edited in Italy, printed in Japan, is a source of information and thought by reporters on all continents. Especially salient was a description of protests by Swedish women, reported in the January 1985 number. Subscription for the quarterly is \$6.50 to U.S. agent, Charles Power, 755 Cedar Ave., Long Beach CA 90813.**

---

### NE FORGESU VENI AL M.I.T.!!

Aliĝiloj por la ELNA Kongreso ĉe M.I.T. en Bostono alvenos en via poŝto baldaŭ. Aliĝu frue! Elstara programo estas preparita far la Loka Kongresa Komitato. Se ial vi ne ricevas la aliĝilon aŭ se vi bezonas ekstrajn kopiojn, informu la Centran Oficejon de ELNA, Box 1129, El Cerrito CA 94530.

Registration forms for the ELNA Convention at M.I.T. in Boston will arrive in your mail soon. Sign up early! An outstanding program has been prepared by the Local Convention Committee. If for any reason you do not receive the registration form or if you need extra copies, inform the Central Office of ELNA, Box 1129, El Cerrito CA 94530.

## LOCAL NEWS CALIFORNIA

**Berkeley Konversacia Rondo** kunvenas ĉe restoracio Rezas la trian dimanĉon monate.

**Orange County** - Welcome to ELNA's newest club! Last summer's front-page article in the *Los Angeles Times* about the accelerating Esperanto program in Chinese universities attracted the then-mayor of Garden Grove, J. Tilman Williams. Folio Kim, a Korean Esperantist, was invited to teach classes and the new club was formed. We are pleased to introduce the new officers: President, J. Tilman Williams; Vice Presidents, Paul L. Studier, Roger Hiles, and Folio W. Kim; Secretary, Virginia McCabe; Treasurer, Chuck Helms.

**Walnut Creek:** "A World Vision - Eliminating All Barriers", a forum sponsored by Baha'is of Central Contra Costa County, invited Charles Martin and Roberta McFarland to speak April 6 on "Universal Auxiliary Language."

### FLORIDA


See photo 1: l-r Joan Dorey, Naomi Seijo, John Maloney, Magly Zimmerman, kaj Florence Susser, some of Sergio Docal's students in No. Lauderdale FL.

See photo 2: l-r Moulud Saghafian, Iran; Mario Fiorelli, Italy go sightseeing with Magly Zimmerman and Sergio Docal. (photos by Sergio Docal)

### TEXAS

**Harlingen and Brownsville** - Prenda Cook has had TV interviews, the most recent on TV station KVEO. An NBC affiliate, KVEO was very cooperative in showing an easily understood Esperanto text on the screen which Mrs. Cook read aloud. Her various classes were announced repeatedly. They have already booked interviews in time for Fall classes next October.

### Houston -




John Victery's Esperanto class ended with a festive cake.


John Victery, teacher at Kincaid School (private) reported that the course lasted three weeks, meeting one hour and 10 minutes daily, using the *Jen Nia Mondo* textbook and tapes. "An evaluation made by individual students at the end of the course showed remarkable enthusiasm and idealism toward Esperanto and its need in our world. One stated: 'It's wonderful to study a language not all screwed up like English and Spanish'...Many of them say 'hello' to me



1



2



Kincaid School Esperanto Class Photo: (standing r-l): Trey Alsup, Massato Otsuka, Michael Shuman, Chris Gillett, Adam Gould, Margaret Ponig, Marci Knight, Mary-Lou Smulders, Mandy Lehman, Tavenner King, Ellie Harters. (Kneeling r-l): Charles Stephenson, Ty Dickerson, Lucy Anderson, Kendal Quinn, Patricia Prim, Courtney Denison, teacher John Victery.

up and down the halls in one or more of the phrases they learned. Yesterday, I was saluted exuberantly with "Jen Nia Mondo!"

"Thank you for recommending *Jen Nia Mondo*, and for all the encouragement you offered me when I called back in the fall. The course was outstanding from any viewpoint. Yes, it is scheduled again for Interim Term, 1986!"

## RECENZOJ

*Misio sen alveno* - John Francis (TK-Stafeto) 159p \$9.50  
Mi ne multe ŝatas sciencfikcion. Tro ofte ĝi ŝajnas al mi dependi de malprobablaj sciencumiloj kaj ne de profunda kompreno pri homaj rilatoj, aŭ propagandi malinterese simplegajn vidpunktojn pri la vojo de ni homoj laŭirenda. Tamen mi de temp' al tempo legas sciencfikciaĵojn almenaŭ cele al rekonfirmo de miaj antaŭjuĝoj! Plej laste, do, mi legis verkon de John Francis, *Misio sen alveno*, kiun mi ege ĝuis. Ĝis mesaĝo estas iom subtila, ĝia uzo de eksterprobablaj maŝinoj estas maldevojiga, kaj la lingvo uzatas tute nature, tiel ke oni facile imagas, ke la ĉefroluloj parolas Esperanton tute senpense. Sed la plej forta aspekto de la romano, por mi, estas la priskriboj, kiuj ofte estas samtempe kaj rektaj kaj oblikvaj. Tiel move priskribiĝas giganta pramondo sur alia planedo, ke la sentoj de homoj (kaj de preskaŭhomoj) kiuj sin trovas tie vibre sentebles tute laŭ la priskriboj de la pramondo mem. Kaj la banalaĵoj de movada konkurenco de estontaj teranoj subtile kreas reton de kompreno pri la tiama mondo sen neceso de rekta priskribo. Mi ne pretendu, ke *Misio sen alveno* estas majstroverko de nia literaturo, sed mi trovis ĝin alloga, interesa libro.

– David K. Jordan

**ESPERANTO: KIAL KAJ KIEL.** M.A. Dissertation, University of Minnesota, by Rev. Reuben A. Tanquist. (Reported in *Enciklopedio de Esperanto*, p. 301)

Reuben Tanquist, a retired clergyman now residing in Portland, Oregon, based his dissertation on a sociological and psychological investigation of the Esperanto-speaking community. He surveyed 755 individuals: 188 Americans, 232 Britons, 335 other Europeans.

The dissertation was published in *Sociology and Social Research*, Vol. XII, July-August 1928, No. 6. In that magazine the title was "Social Interest in Esperanto." Dr. Lehman Wendell's Esperanto summary appeared in *Esperanto*, April 1930.

An interesting comparison might be made of Mr. Tanquist's early studies and Peter G. Forster's *The Esperanto Movement*, published in 1982. Rather striking was the difference in how men and women became interested in Esperanto. Word of mouth was effective in attracting women (73%) vs men (27%). The written word (literature, posters, etc.) was responsible for 42% of males, 27% of females.

International relations, linguistics, correspondence, and tourism led all other reasons for learning and using Esperanto. Some things have not changed much. Self-instruction, private and club courses provided most of the instruction.

A compendium of similar dissertations leading to degrees in schools of higher education is being compiled under the direction of Edward Symoens, Belgium.

*LA BLINDA BIRDO*. István Nemere. 118 p. HEA, Budapeŝto, 1983. \$7.65.

Sven Viborg estas verkisto en la fornorda lando Skandio. Jam li verkis plurajn librojn, fariĝis famekonata en la aŭtoraj rondoj. Li estas alta, blondhara, bluokula skandinavo, kiu akceptas la ĉiutagajn liberaĵojn de sia lando kiel ordinarajn didonitaĵojn, kiujn rajtas ĉiu persono.

En verkista kongreso li konatiĝas kun Govan Dyebo. Govan estas verkisto el la forsuda lando Suda Respubliko. Por li la verkado kaj eldonado ne estas tiel facilaj kiel ĉe Sven, ĉar

"...hejme mi estas eksterurba ... instruisto en malpurega lernejo – kaj neniam mi povos fariĝi io alia. ... hejme la cenzuro nur ĉiun kvaran-kvinan jaron permesas eldoni iun mian romanon – kaj eĉ tiam mi devas batali kontraŭ cento da baroj..." [paĝo 28]

Ĉar Govan ne estas alta, blondhara, bluokula: li havas nigran hararon, nigrajn okulojn – kaj nigran haŭton. Kaj en la Suda Respubliko tiu lasta estas la signo de Kaino.

La usona sciencfikcia verkisto Robert Heinlein iam skribis, ke estas ĝuste tri romanintrigoj en la Okcidenta literaturo: Viro kun Virino; La Eta Tajloro (ordinarulo fariĝas reĝo); kaj La Homo Ŝanĝiĝas. Ĉi tiu romano estas neta ekzemplo de la lasta. Govan, rifuĝinto el sia lando, reiras tien kaj tuj malaperas en la gulagon. Sven veturas al la Suda Respubliko por trovi kaj liberigi sian amikon, sekura kaj certa pro siaj kredoj je la Eternaj Rajtoj de la Homo. Pri tiuj eternaj rajtoj li baldaŭ seniluziiĝas, kaj en la fino – kaj nur helpe de tiuj, kiuj pretas uzi perforton – li sukcesas elkarcerigi Govanon. Eĉ tiu lasta rezigno pri la Regado de la Juro tamen pruviĝas senutila.

Falsaj nomoj ne povas kaŝi la identojn de la koncernaj landoj. Skandio estas memevidente Svedio. Kaj se la diskriminacia traktado de nigruloj ne malkaŝus la veran nomon de la traktata lando al la observema leganto, tion tuj farus la nomoj de la ĉefaj urboj (Pretville = Pretoria, Joburg = Johannesburg).

Tamen ŝajnas evidenta al mi, ke Nemere skribas nek pri nigruloj nek pri Sudafriko en sia romano – aŭ almenaŭ ne pri ili – sed ankaŭ pri ĉiuj totalismaj ŝtatoj de la mondo. La alineoj sur paĝoj 66-68 povus facile temi pri landoj, kiujn Nemere pli bone konas ol Sudan Afrikon.

Antaŭ tri jaroj William Auld verkis libron (*Vereco, Distro, Stilo*), en kiu li listigis entute 50 romanojn verkitajn en Esperanto dum pli ol 90 jaroj. En la pasintaj tri jaroj Nemere propraverkile aldonis pliajn dek procentojn al tiu nombro (*La Fermita Urbo, Sur Kampo Granita, Febro*, kaj la ĉitraktata verko). Ili ŝajnas ĝenerale bonaj laŭ stilo kaj enhavo. *La Blinda Birdo* estas facile legebla, aktuala, streĉa kaj ĝenerale interesa. Mi kore rekomendas ĝin al vi.

– Don Harlow

*Esperanta Antologio: Poemoj 1887-1981*. Edited by William Auld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 887 pages. Price from ELNA: \$21.75 (ELNA members \$18.95)

When I was very young  
I heard a wise man say  
That Esperanto was the tongue  
We all would speak someday.

Poetry derives from milieus in which writing is uncommon and printing unknown. Absent the printed word, the meter and rhyme of poetry are what give words and ideas a stylistic framework that makes them easier to memorize, to pass on from generation to generation without change. It is no accident that the tribal works presented in Tibor Sekelj's *Elpafu la Sagon* are couched in poetic language. So too we can see that in our own linguistic background the earliest popular tales and legends (e.g. *Beowulf*) are poetry, while the contemporary prose works (*the venerable Bede*) were aimed at a literate, educated, clerical class. The decline of poetry in the English-speaking world followed the coming of the printing press; Shakespeare, who wrote a century later, was perhaps the last of those who aimed his poetic works at the masses. By the end of the seventeenth century the ballad had largely been replaced by the short story, the epic poem by the novel. For memorization becomes unimportant in an era of mass literacy and printing; and prose is much less demanding on the writer than poetry in terms of inventiveness and creativity.

All of which raises an interesting question: why has poetry been the major literary form in Esperanto, a language used far more in its written than in its spoken form, the only language in the world (with the possible exception of Icelandic) with a 100% literacy rate, throughout its first century of existence? The *Esperanta Antologio*, here presented in its second incarnation, is a celebration of this rather strange fact.

The book, the editor informs us, contains a total of 706 poems by 163 authors from 35 countries of the five continents. I will try here not to repeat those things that have already been reported by others, but will recommend the interested reader to Gaston Waringhien's excellent review (*Esperanto*, December 1984, pp 201-203); those who are interested in the earlier edition might also refer to the same author's essay "De unu antologio al alia" (in *Kaj la ceter' – nur literaturo*, Antwerp: Stafeto, 1983, p. 167). But I would like to add a few interesting observations about this new book.

Seventy-three of the authors are new to this edition. Twelve of these were born more recently than any of the earlier authors (one – Mauro Nervi – was not even born when the first edition appeared), but Auld has not stinted others from earlier periods. Consider the following words:

Mallaŭta voĉo de l'venonta vintro  
Tra nia norda lando ekmurmuris;  
La floroj velkas sub ĉielo griza,  
Hirundamikoj aliloken kuras.

Would you believe that when Clarence Bicknell, the "new" Esperantist poet who wrote that verse, was born, Martin van Buren was president of the United States, Texas was an independent republic, and the first settlers were heading west over the Oregon trail?

Yet there are plenty of recent poets who were either born late or bloomed late. The average date of birth for poets in this edition has advanced ten years from the first edition – from 1896 to 1906. Beside the Zamenhofs and Kalocsays and Schwartzes and Baghys of the earlier edition, still well-represented here, we have the Giorgio Silfers and Eva Tofalvis and Mauro Nervi and Armand Sus who had not even been heard of twenty-six years ago.

Pace the editor, not all five continents are represented here, unless New Zealand is to be considered a part of the Australian landmass. Africa is represented by one poet (Edwin de Kock), North America by three, Latin America by six. The numbers are generally higher than in the first edition, but not proportionately so.

One interesting increase is in the number of Esperanto poets whose native languages are Asian. The Chinese poet S.-J. Zee, present in the first edition and best known since for his work as compiler and translator of *El Ĉina Poezio*, has been joined by his young fellow countryman Armand Su. And Ito Saburo, the only Japanese poet in the first edition, now has no fewer than *eight* colleagues, including such well-known luminaries as Miyamoto Masao and Ueyama Masao. Interestingly enough, although several of these poets became known to the Esperanto world through *haiku* published in the late sixties and early seventies, *not one* of them was born later than 1913. Does this mean that the younger Japanese Esperantists are not interested in poetry? Or do the Japanese consider that poetry springs more from age and wisdom and less from youth and inspiration than we in the West do?

The first paragraph above implied, though it did not state, that poetry, to be proper, should appeal to the ear rather than the eye. Most of the poetry in this book fits that criterion; but there are a few "poems" that include typographical tricks aimed strictly at the eye. See particularly Miyamoto Masao's "Mozaïke" (pp. 702-704) and William Auld's "La Infana Raso VIII" (pp. 395-398). The minor trick of indentation in Nicolino Rossi's "Al Vjetnamio" (pp. 765-766), on which appreciation of the poem fortunately does not depend, is ruined by the fact that the poem is split between opposite sides of the same leaf. Whether such tricks are justifiable in poetry is a question which I personally would be tempted to answer in the negative.

Most of the poetry here, though, is eminently suitable for reading aloud: Esperanto clubs please note. William Auld's "Ebriö" is a good example of a poem that can be appreciated *only* upon hearing it declaimed.

The level of poetic style is generally high, as you would expect from a carefully-selected anthology. The heinous crime of *adasismo* (rhyming on identical suffixes) is nowhere terribly evident, even in the earlier poetry; in Kofman's long "Filino de Iftah" (pp. 17-22), for instance, out of ninety-nine verse pairs only six are adasistic. As Auld has elsewhere pointed out, L.L. Zamenhof himself is perhaps the greatest culprit in this regard. See also Aurel Boia's satirical (?) "Odo al Adasismo" (pp. 821-823).

One poetic “innovation” which may seem strange to the English-trained ear should be remarked. Many Eastern European poets (and over a third of those represented in this volume fall into that class) consider a rhyme on the stressed vowel to be sufficient compensation for lack of a rhyme on the grammatical ending. So we have, for instance, such pairs as *palaj/cimbaloj* (Kofman, p. 19) and *karnon/varman* (Ljubin, p. 215). Unlike *adasismo*, this is considered acceptable practice in Esperanto.

ELNA members will find pp. 663-667 of particular interest (Jes, Dorinjo, temas pri via poemo!). And all readers, when they grow tired of the serious poets, should turn to the selections from Raymond Schwartz, or perhaps to pp. 687-688, where they can read Bertram Potts’ “Rakontu, Kara Avĉjo”, from which this is a typical verse:

Rakontu, kara Avĉjo, pri kiam vi vin trovis  
 en krokodila buŝo profunde de rivero  
 kaj kiel vi strangolis la beston kaj ne povis –  
 ĝis kuŝis ĝi senviva! – leviĝi por aero!

In his afterword Auld defines four periods of Esperanto poetry, as opposed to his triune division in the first edition; primitive romanticism (1887-1921; but read Auld’s definition on p. 835 and then turn e.g. to the Brazilian poet L.H. Knoedt, pp. 753-755); mature romanticism (1921-1931; this would obviously include Kalocsay’s seminal *Streĉita Kordo*); Parnassism (1931-1956; the period of strongest influence of the *Parnasa Gvidlibro*); and postparnassism (1956-1982). Other classifications are possible; my own would be based on the major publishers of poetry during the period in question (Esperantismo, Larevuismo, Literaturamondoismo, Stafetoismo, Fontoismo...maybe). After reading this book, you are welcome to create your own.

Is this a “good” book in terms of its poetic content? My answer would have to be a qualified “yes.” Most of the poets represented have mastered their medium – an impressive achievement, considering that every single one of them wrote this poetry in what was to him/her a foreign language. The poems published here are stylistically superior and, in most cases, enjoyable to the ordinary reader. However, I don’t wish to claim that any of this is *great* poetry. Auld’s *Infana Raso*, several selections from which are printed here, is outstanding; but it cannot be said that Esperanto has given the world its equivalents of Chaucer, Milton or Shakespeare. Perhaps it will never do so. Which brings us back to our original question: Why has poetry been Esperanto’s strongest and most successful literary form in an age when prose predominates?

In the first paragraph I suggested that “prose is much less demanding on the writer than poetry in terms of inventiveness and creativity.” It is a serious flaw in most languages that they actually *punish* inventiveness and creativity; just when the small child learning the language thinks that he has figured out the rules, along comes an irregularity to disabuse him (such response to generalization, when applied to rats in cages in the form of mild electric shocks, can lead to schizophrenic behavior, or worse). In such languages poetry is an expensive luxury for the individual, and only the most enthusiastic ever get fully involved with it; and even then poetry often devolves into the “free verse” so common in Berkeley coffee shops. Esperanto, on the other hand, is perhaps

the world’s only language that not only rewards but *demand*s inventiveness from the speaker. It is then understandable that the Esperanto-speaking writer would find the creation of poetry less difficult and more attractive than his ethnic-speaking counterpart. Because this point is intrinsic to the structure of the language, I expect that it will not change in the future.

